

JURA
TRIBUNO
INTERNACIA



N-ro 17
Jaro 2018
Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Eldonas: INTERNACIA JURISTA ESPERANTO-ASOCIO
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Poŝta Adreso: José María Rodríguez Hernández
JURA TRIBUNO INTERNACIA
Apartado de Correos 3142
E-14080 CÓRDOBA (Hispanio)

Elektronika Adreso: esperanto14@ono.com

Direktoro: José María Rodríguez Hernández

Kunlaboris ĉi-numere: D-ino Rafaela Urueña Álvarez
S-ro Miguel Faria de Bastos
S-ro Świętosław Fortuna

La revuon ricevas ĉiuj membroj de IJEA. Por aliĝi al nia asocio informoj aperas sur la paĝo 9-a

Depósito Legal: CO-844/97
Edita: Asociación Andaluza de Esperanto
Apartado de Correos 611
14080 Córdoba
Imprime: Litopress SL

ENHAVO

	Paĝo
Prezento	5
Raporto pri la kunsido de IJEA dum la Universala Kongreso. Seulo 2017.	12
Vivo de la Asocio	13
<i>Serafim de Freitas</i> kaj la polemiko “libera maro” kontraŭ “fermita maro” dum la 17-a jarcento.	19
Eksterlandaj ne-plenaĝuloj ne-akompanitaj en Eŭropo.	31
Galerio de ilustraj esperantistaj juristoj	40
Mallongaj juraj informoj	41
Jura Vortaro	46
El nia Gazeto-teko: “ <i>La koncepto de Neŭtraleco en Internaciaj Rilatoj kaj Internacia Juro</i> ” de D-ro Ivo Lapenna.	50
Juro kaj Kino	66

PREZENTO



La plej okul-frapa karakterizaĵo de ĉi tiu lasta jaro estis la timo antaŭ ĉio venanta el foraj landoj aŭ kulturoj: Prezidanto Donald Trump promesis, dum sia politika kampanjo, starigi muregon inter Usono kaj Meksikio kaj eŭropaj ŝtatestroj parolas pri la konstruo de koncentrejoj, kie arigi ĉiujn kontraŭ-leĝajn enmigrintojn kiuj provas eniri sur-boate en Eŭropo. Hazarde, neniu el tiuj eŭropaj ŝtatestroj planas konstrui

tiujn kampojn en Eŭropo, ili pripensis la eblon pagi al nord-afrikaj aŭ al orientaj ŝtatoj por koncentrigi tie la eksterlandanojn kiuj deziras eniri en Eŭropon. Eĉ Britio, kies socio tradicie estas formata de homoj el la tuta *Commonwealth*, deziras forlasi Eŭropon pro la konstanta “invado” de eŭropaj enmigrantoj. Verdire, tra la okcidenta mondo flugas blovo de timo kontraŭ ĉio venanta el fremdaj landoj.

Iu diris antaŭ unu jarcento, ke ni ne estas francoj aŭ britoj, poloj aŭ germanoj, male, ni estas homoj apud homoj. Se la Prezidanto Trump aŭ la eŭropaj ŝtatestroj parolus esperanton, ili eble komprenus reale kion signifas tiu frazo, sendube la plej bela eldirita en la zamenhofa lingvo. Tiel, ne estas centr-amerikaj enmigrantoj preter la usona landlimoj; ne estas sub-saharanoj en la boatoj kiuj navigadas sub teruraj kondiĉoj el Libio; ne estas sirianoj, bangladeŝanoj aŭ afganoj tiuj kiuj atingas mirakle la grekajn insulojn en la Egea Maro, ili estas homoj, tute egalaj al la enloĝantoj de la riĉaj landoj en kiujn ili deziras alveni.

Tiu bela frazo iam dirita en esperanto, nun-tempe povus esti re-proklamita en la senco, ke ni ne estas francoj aŭ britoj, poloj aŭ germanoj, centr-amerikanoj aŭ usonanoj, sub-saharanoj aŭ hispanoj, sirioj aŭ germanoj, afganoj aŭ francoj, ni ĉiuj estas homoj. Kaj kion ni povas fari? Tre simple, agi kiel homoj !



Ĉi tiu nova numero de nia revuo prezentiĝas kadre de Universala Kongreso de Esperanto okazanta en unu el la plej belaj landoj en Eŭropo: Portugalio. Simpla trarigardo ĉe la stratoj de Lisbono montros al partoprenanto en la Kongreso, ke la portugala socio estas speciala. La mond-konata *Praça do Comercio* (Placo de la Komerco) estas tute malfermita al la Oceano. Tiel, ĉiu-loke placoj havas fermitajn flankojn, tamen ĉi tie, kontraŭe, la urbo invitas al la maro alveni en ĉi tiun urbon, tio estas: al la tuta mondo kiu troviĝas preter ĝi. Pro tio, sur la trotuaroj de Lisbono Vi trovos ĉiu-rasajn homojn kiuj loĝas paceme en akceptema urbo. Ĉiuj estas bonvenaj kaj ĉiuj estas gaste akceptitaj. Nu, ĉu povas ekzisti pli esperantema urbo?

Pro tiu speciala kondiĉo de la urbo kaj ankaŭ de la propra Universala Kongreso de Esperanto, nia asocio devas ludi specialan rolon. Dum la pasintaj jaroj ni ja supervivis, ĉar la simpla ekzisto de jura asocio en Esperantujo jam estis sukceso. Tamen, ni nun devas antaŭen-paŝi kaj pli-seriozigi la laboron de la jura asocio, kiu ekde la pasinta jaro, kiel Vi probable scias, ricevis novan nomon: *Internacia Jurista Esperanto-Asocio*.

Espereble la renkontiĝo de juristoj kadre de la Universala Kongreso estos pli multenombra ol tiuj de pasintaj asembleoj. Prezidata de portugala Advokato Faria de Bastos, la asocio devus fiksi konkretan labor-programon por la venonta jaro. Ĉeesto en interreto, eldonado de libro ĉiu-jare en esperanto, produktado de novaj kursoj en la reto, devus esti atingebla defio por nia asocio. Krome, ni devas esti konsciaj, ke ni ricevos la kunlaboradon de tiuj esperantistoj kiujn sin dediĉas al jura kampo, nur se ni agadas kaj vidigas niajn projektojn.

Kaj se paroli pri la revuo kiun Vi havas enmane, ni denove dankas la kunlaboremom de nia Sekretario, D-ino Rafaela Urueña, kiu esploras ĉi-numere pri Serafim de Freitas, portugala internaci-juristo de la 17-jarcento, kiu verkis pri maraj aferoj. La direktoro de la revuo prezentas eseon pri la ne-plenaĝuloj kiuj eniras en Eŭropon ne-akompanitaj, ĉu ili devas esti rigardataj kiel infanoj aŭ kiel kontraŭ-leĝaj enmigrintoj? La kutimaj sekcioj de la revuo, tio estas “Mallongaj Juraj Informoj” kaj “Jura Vortaro” ankaŭ aperas sur ĉi tiu numero kaj fine, ni daŭrigas la serion de artikoloj pri Juro kaj Kino, kiun ni ekigis sur la pasinta numero.

Do, espereble la revuo plaĉos al Vi. Denove ni diras, ke estus necese agadi, ene de la asocio, laŭ konkreta plano, ne laŭ la fortoj aŭ sindediĉoj de unuopuloj, ĉar tio ne certigus konstantan laboron estontece. Tiel, estus konvene aprobi jaran agad-planon en nia asocio, kaj en tiu planado la daŭrigo en la eldono de nia revuo, eĉ du-foje en la jaro, devus esti atingebla projekto.

Nu, bonvenon en Lisbonon. Ĝuu la etoson de unu el la plej ĉarmaj urboj en Eŭropo. Urbo kiu, samtempe, estas Eŭropo, Ameriko, Afriko kaj Azio, ĉar portugaloj disvastigis sian kulturon kaj sian belegan lingvon tra la tuta mondo kaj hodiaŭ akceptigas en sian socion, la valorojn de homoj el ĉiuj kontinentoj.

Ni ne estas eŭropanoj, afrikanoj, amerikanoj, azianoj aŭ oceanianoj, ni estas nur homoj apud aliaj homoj kaj krome, kun komuna lingvo.

José María Rodríguez Hernández
Direktoro de
JURA TRIBUNO INTERNACIA



Internacia Jurista Esperanto-Asocio

ALIĜU AL ESPERANTA JURA ASOCIO

Ordinara membro devas esti profesia juristo aŭ posedi universitatan aŭ ekvivalentan diplomon pri juro aŭ esti studanto por tia diplomo. Ĉiu alia persono povas peti aliĝon kiel asocia membro. Membrigo kosta 7 eŭrojn se vi loĝas en iama socialisma lando de Orienta Eŭropo, Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko aŭ Latina Ameriko. Kaj 14 eŭrojn se vi loĝas en alia lando.

Eblas pagi al UEA-konto ejax-r (pri pagmanieroj vidu en la *Jarlibro* de UEA). Se kotizi kaŭzus al vi transpagajn aŭ ekonomiajn malfacilojn, bv. skribi pri tio al nia elektronika adreso: esperanto-juro@ono.com



Kunlaboru kun *JURA TRIBUNO INTERNACIA*

Se Vi emas verki en esperanto pri juraj temoj ni plezure aperigos Viajn kontribuaĵojn en niaj paĝoj. Vi nur devas atenti pri la jenaj kondiĉoj:

ARTIKOLOJ: rilataj al iu jura branĉo. Do: krimpuna, ekonomia, imposta, civila, internacia, historia, filozofia, administracia, ktp. Pri la

longeco, pli malpli 4/10 foliojn A4 (unuflanka duobl-spaca). Se eble aldonu kelklinian resumon pri la artikolo.

RECENZOJ: Vi povas recenzi verkon. La libro elektota devas temi pri Juro, kvankam ne necese pri/en esperanto. La libro povas esti redaktata en kiu ajn lingvo, tamen la recenzon oni devas verki en esperanto.

INFORMOJ: Vi povas informi pere de ĉi tiuj paĝoj pri juĝoj, novaj leĝoj, internaciaj aferoj, traktatoj, ktp, aŭ pri io rilata al la Juro en Via lando aŭ komunumo. La informoj devas ampleksi 1/3 foliojn.

TRAKTATOJ: se Vi tradukis kelkan internacian traktaton, aŭ scias kie aperas la Esperanto-traduko de kelka internacia kunveno, informu al ni pri tio.

Ne dubu kunlabori kun la jura revuo. La proksima numero aperos dum la monato junio 2015, do, prefere se oni ricevas la materialon antaŭ la fino de la monato majo 2015.

La redakciaj adresoj estas:

✉ *Jura Tribuno Internacia*. Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

💻 esperanto-juro@ono.com



Supremo Tribunal de Justiça / Supera Justica Tribunalo Lisbono



**Raporto pri la kunsido de
Internacia Jurista Esperanto-Asocio
dum la Universala Kongreso
Seulo 2017**

La kunveno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio estis planita je la 27-a de julio 2017 en Seulo dum la 102-a Universala Kongreso.

Bedaŭrinde ne alvenis nia Prezidanto, Advokato Miguel FARIA DE BASTOS, kiu ne povis flugi el Portugalio en Koreion pro malfeliĉa aŭtomobila akcidento.

En salono “Blanke” je la 16:45 horo alvenis malgranda grupo de geesperantistoj:

- Ivan OSIBOV, profesoro de juro de Kroatio.
- Katja OSIBOV, advokato de Kroatio.
- Ivan SLIVOV, advokato de Bulgario.
- Graça Eliana THULER SANTOS, advokato de Brazilo.
- Hoi JUNG-CHUNG, advokato de Koreio.
- Brian R. MOON, de Luksemburgio.
- Swietoslaw FORTUNA, jura konsilisto de Pollando.
- Chansong JONG, ekonomikisto de Koreio.

Ĉeestantoj interparolis pri la kongreso kaj pri diversaj juraj problemoj en siaj landoj. Inter kolegaro estis amika, agrabla atmosfero. La renkonto daŭris pli longe ol planita tempo.



Partoprenantoj en la kunsido de IJEA en Seulo 2017.

Vivo de la Asocio

§ Kiel akordite nia asocio ellaboris interretan kurson pri “Internacia Mar-Juro”. La unua celo de la kurso estis havigi ĝin al la respondeculoj de la Universitato de Esperanto kaj tiel disponigi ĝin al eblaj interesitoj, adicie al kursoj jam ekzistantaj en tiu interreta Universitato pri Astronomio kaj Informadiko.


Bedaŭrinde ĉi tiu Universitato fine ne akceptis la kurson, pro la fakto, ke la interretaj kursoj ekzistantaj tie baziĝas ĉefe en prelego de universitata profesoro. Male la ellaborita kurso pri Internacia Mar-Juro de nia asocio, estas aro da lecionoj kun interretaj prezentaĵoj kaj fina kontrolo de konoj en ĉiu leciono. Tio estas, la kurso pri Internacia Mar-Juro propozita de nia asocio ne estas prelego de profesoro.

Nu, evidente ni ne povas flanke-lasi la projekton kaj pro tio ni disponigas la kurson al ĉiuj interesitoj. Baldaŭ la projekto okupos propran TTT-paĝon en la reto, tamen nun ĝi estas alirebla en la jutuba kanalo de nia asocio “Internacia Jurista Esperanto-Asocio”. Do, ni invitas ĉiujn interesitojn malfermi la kurson kaj sekvi la tutan lecionaron.

Simple serĉu ĉe jutubo la kanalo “Internacia Jurista Esperanto-Asocio”. Tie Vi trovos dek lecionojn pri Internacia Mar-Juro. Jen la konkreta enhavo:




1-a Leciono
Historio de la Internacia Regularo
pri Mar-Juro.
Tempo-daŭro: 14:38 minutoj.



2-a Leciono
Maraj Zonoj kaj Ŝtata Suvereneco.
Tempo-daŭro: 10:08 minutoj.




3-a Leciono
La Kontinenta Breto.
Tempo-daŭro: 09:38 minutoj.



4-a Leciono
La Alta Maro.
Tempo-daŭro: 10:03 minutoj




5-a Leciono
Navigado en la Maraj Areoj.
Tempo-daŭro: 11:17 minutoj.



6-a Leciono
Insuloj kaj Arkipelagaj Ŝtatoj.
Tempo-daŭro: 12:31 minutoj.




7-a Leciono
La Maraj Fundoj kaj la
Internacia Komitato pri
Marfundoj.
Tempo-daŭro: 10:44 minutoj.



8-a Leciono
La Rajto Fiŝkaptadi.
Tempo-daŭro: 11:54 minutoj.



9-a Leciono
La Internacia Tribunalalo pri
Marjuro.
Tempo-daŭro: 07:48 minutoj.



10-a Leciono
Metodoj por difini limojn en
la Maro.
Tempo-daŭro: 11:26 minutoj.

La Asocio invitas ĉiujn interesitojn sekvi la kurson kaj, kompreneble, havigi al ni viajn opiniojn tiu-rilate. Nova kurso pri “Azilo kaj Internacia Protektado” aperos dum la jaro 2018.

§ Hispana Esperanto-Federacio enretigis la prezenton de la libro “Eŭropa Unio, paŝon post paŝo”, eldonita de nia asocio kunlabore kun Andaluza Esperanto-Unuiĝo. La prezento de la libro, fare de la aŭtorino mem, D-ino Rafaela Urueña Álvarez, okazis en la urbo Ronda, okaze de la Hispana kaj Andaluza Kongresoj de Esperanto en la jaro 2014.

Jen la ret-situo de la prezento

<https://esperanto-tv.com/926>



§ Advokato Miguel Faria de Bastos, Prezidanto de nia asocio, petis oficiale al la Fakultato de la Universitato *Lusíada* en Luando (Angolo) la organizadon de kurso de Esperanto en tiu afrika universitato. La peto estis tre bone akceptita de la Fakultatestro, S-ro Eduardo Vera-Cruz, kiu apartenas a la Honora Komitato de la Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Lisbono.

Kvankam ankoraŭ ne okazis oficiala akcepto, la respondeculo de la ebla kurso pripensis la organizadon de baza kurso kun 14 lecionoj, 10 bazaj pri la lingvo kaj kromaj 4 pri temoj specife lingve juraj.



Paralele al tiu peto, S-ro Faria de Bastos ankaŭ petis al la Kultura Ataŝeino de la Portugala Ambasadro en Luando (Angolo), la havigon de ĝia auditorio por ebla prelego, kun sekva kolokvo, pri la temo: *“La rajto al la lingvo -gepatra, etna, oficiala kaj pan-vehikla- kiel fundamenta homara rajto, vidalvide al la angola leĝa sistemo, al UNESKO kaj al internaciaj traktatoj kaj deklaroj”*.




Faculdade de Direito / Jura Fakultato Universitato de Lisbono



***Serafim de Freitas* kaj la polemiko “libera maro” kontraŭ “fermita maro” dum la 17-a jarcento**

 **D-ino María Rafaela Urueña Álvarez**
Profesoro pri Internacia Juro

Hazarda okazintaĵo en 1603, pro la kapto de la portugala karako-ŝipo Sankta Katerina fare de du nederlandaj ŝipoj, de la “Kompanio de la Orientaj Indioj” en la Hinda Oceano, kaŭzis gravan polemikon pro la konfronto de kelkaj el la plej elstaraj verkistoj kaj juristoj el Nederlando (Hugo Grotius) kaj tiuj apartenantaj al la hispana monarĥio (Serafim de Freitas) inter aliaj.



Komence de la koloniado en la Moderna epoko, Hispanio estis la nura eŭropa lando kie aro de intelektuloj prezentis dubojn pri la legitimeco de la konkero de Ameriko, anstataŭ pravigi ĝin pro tradiciaj kialoj. Estis konataj pluraj polemikoj pri la laŭleĝaj titoloj kiel tiu el Valjadolido (Hispanio 1550-1551) kiuj

sekvis la doktrinon de la ĵus forpasinta hispana dominikana Pastro Francisko de Vitoria, tuj post la malkovro de Ameriko. Fakte, Vitoria estis la unua kiu aŭdacis nei la taŭgecon de la buleoj de Papo Aleksandro la 6-a kiel validan titolon de proprieto de la malkovritaj teroj. Li neis eĉ la universalan povon de la imperiestro kaj la surteran povon de la Papo sur Ameriko.

Vitoria analizis kiajn titolojn estis laŭleĝaj kaj kiajn kontraŭleĝaj en tiu koloniado, kaj fine li trovis ok justajn titolojn, eble la plej grava estas tiu pri la rajto de ĉiu homo vojaĝi kaj komerci kun la tuta mondo, sendepende de la politiko aŭ la religio de ĉiu popolo. La indianoj de la malkovritaj teroj ne estis neinteligentaj, kiel opiniis kelkaj tiutempaj teologoj kiel J. G. de Sepúlveda, sed liberaj homoj pro naturjuro kaj mastroj de siaj teroj. Do, ĉu la hispanoj kaj portugaloj portis laŭleĝajn titolojn por preni tiujn terojn? Tiu estis la demando de Vitoria.

Ankaŭ la mara libereco, defendita ekde la 15-a jarcento de la Hispana Skolo pri Naturjuro, komencis per la doktrino de Francisko de Vitoria, kiu danke al siaj lekcioj en la Universitato de Salamanko, defendis la latinnotatan “*Ius communicationis*” (komunikadrajto) postulata en siaj “*Releccioj de Indiis*” (Lecioj pri Indio) .

Li fundamentis tiun rajton sur la naturjuro, okaze de la malkovro de Ameriko en 1492, kiam en la Universitato de Salamanko oni kutimis gvidi eksterordinarajn lecionojn por klarigi specialajn tiamajn aktualajn eventojn.




Tiun defendon sekvis alia hispana juristo, nome Vázquez de Menchaca (Vaskes de Menĉaka) dum la 16-a jarcento, kiu en sia verko “*Controversiarum illustrium*” (de la gravaj diskutadoj) defendis ankaŭ la marliberecon. Sed la vera polemiko libera maro kontraŭ fermita maro, troviĝas siajn radikojn en la romian juron kaj la hispanan skolastikon, kaj definitive ĝi montriĝis speciale grava en Eŭropo dum la 17-a jarcento.

En 1609 aperis en Nederlando broŝuro titolita “*De mare liberum*” (pri libera maro) ku enhavis fortan atakon al portugalaj pretendoj pri teroj kaj ĉefe pri maroj en Azio. Ĝia aŭtoro estis anonima ĝis kiam, post iom da tempo, oni sciis ke tiu libro estis ĉapitro deprenita de alia pli vasta titolita “*De iure praede*” (pri la rajto de predo), kies aŭtoro estis la tiam nekonata Hugo Grotius.

“*De mare liberum*” kaŭzis grandan polemikon kiu ricevis valorajn replikojn, inter ili tiun de la angla Seldem kaj tiun de Serafim de Freitas.

Hugo Grotius

Kiu estis Hugo Cornets van Groot, pli konata per la latinida nomo Grotius? Li naskiĝis la 10-an de aprilo 1583 en Delft, urbo proksima al Hago (Nederlando). Jam 12 jaraĝa li eniris en la Universitaton de Leyden kaj la sekvantajn jarojn li publike defendis filozofiajn kaj jurajn temojn, pro kio li estis prezentata al reĝo Henriko la 4-a,




el Francio, kiel “miraklo el Nederlando”. Li deĵoris kiel advokato de la Kompanio de la Orientaj Indioj, kaj dum tiuj jaroj li verkis “*De jure praede*” (pri la rajto de predo), por defendi la aktivecojn de tiu Kompanio kaj ĝia komerco tra la maroj.

La vivo de Grotius, krome, estis aventurema, ĉar li estis enkarcerigita en 1619 pro sia partopreno en politikaj partioj, tiam batalantaj inter si kaj danke al profito de permeso verki kaj legi librojn, li fuĝis el la prizono ene de unu el la kofregoj kiuj enhavis librojn. Li iris en Parizon kie li verkis “*De jure belli ac pacis*” (Pri la juro de milito kaj paco - 1625), li estis ambasadoro el Svedio kaj iris al Stokholmo, sed kiam li decidis reiri en Nederlandon, impona tempesto ĵetis la ŝipon kontraŭ la rokoj. Malsana, Grotius forpasis en Rostock (Germanio) la 28-an de aŭgusto 1645.

Grotius estas konsiderata fondinto de la internacia juro, sed estis la teologoj-juristoj el Hispanio, de la 15-a kaj 16-a jarcento kiuj unuafoje starigis la problemojn kaj eblajn solvojn pri temoj kiel la markomunikado. (Vitoria, Menĉaka, ktp). Fakte, Grotius konis iliajn verkojn kaj nomis ilin “hispanajn glorojn”. La eldono de “*De mare liberum*” devenas de la fakto ke la Kompanio de la Orientaj Indioj, por kiu Grotius laboris, trovis ene de sia komerca aktivaĵo, la instigon de la portugaloj, tiamaj regatoj de la hispana krono, kiuj, siaflanke, militis kontraŭ Nederlando kaj defendis la monopolon favore al Portugalio en tiuj orientaj maroj.

Du nederlandaj ŝipoj kaptis en la markolo de Malako portugalan karakon, kaj kiam oni volis disdoni la kaptaĵon inter la akciuloj de la Kompanio, kelkaj el ili sentis dubojn, kaj pensis ke ĉiu milito estas neĵusta samkiel la riĉigo per tiuj kaptaĵoj. Pro tio

Grotius ekzamenas la taŭgecon de la milito inter Nederlando kaj Portugalio. Li konkludis ke la ripetita malobservo, fare de Portugalio, de la natura juro al libera komunikado inter popoloj per kapto de nederlandaj ŝipoj, pravigas la militon de Nederlando kontraŭ Portugalio. Grotius defendas la marliberecon, per plurfoja mencio de la hispanaj juristoj kaj neas la regadon de Portugalio sur la Hinda Oceano, ĉar la maro estas nenies propraĵo. Kompreneble Grotius, ne estante katoliko, ankaŭ neas la pravecon de la papaj buleoj de la 15-a jarcento, kiuj koncesiis la proprieton de la plej granda parto de la konata mondo al la reĝoj de Kastilio kaj Portugalio. Grotius reprenis la argumenton de la klasika aŭtoro Ulpiano, laŭ kiu la oceanoj estas senlimaj tiel kiel la aero, kaj ilia uzo estas komuna, ĉar ili estas nenies propraĵo.



La manuskripto de “*De iure praede*” estis konata danke al katalogo kiu anoncis librovendadon, aĉetita de la Universitato de Leyden kaj publikigita en 1864. Ĝia enhavo konsistas el 15 ĉapitroj, la unua prezentas la faktojn, nome, la kapton de la

karakŝipo Sankta Katerina en la Malaka markolo. De la 2-a ĝis la 10-a, oni traktas la militon kontraŭ Hispanio kaj li pravigas la rajton de la nederlandanoj ĉu pro ĝia kaŭzo, ĉu pro la dezirata celo. La 12-a ĉapitro izole publikigita, proklamis la maran liberecon, kontraŭ la tezoj de monopolo, kaj defendas ĝin kiel universalan juron, do, kiel intergentan juron. La du lastaj ĉapitroj celas defendi la taŭgecon de la fiŝkaptado kaj la bonan reputacion de la nederlanda Kompanio de la Orientaj Indioj.

Fine, la juristo de Delft eldonis en 1625, dum sia restado en Francio, la verkon “*De jure belli ac pacis*” (pri la juro de milito kaj paco), dediĉita al reĝo Ludoviko la 13-a, libro kiu estis konata en la tuta mondo, kaj kiu, ĝis la 18-a jarcento estis konsiderata vera kodo de la internacia juro.

Serafim de Freitas

La unua refuto al verko de Grotius estis tiu de skoto William Welwood, per sia verko “*De dominio maris*” (pri regado de la maroj), de 1615, kie la aŭtoro kulpigis la nederlandanon pravigi la troan fiŝkaptadon de Nederlando en skotaj akvoj. Grotius replikis tiun kritikon en libro nekonata ĝis 1872.

En 1625 aperis en Valjadolido (Hispanio) “*De justo*

imperio lusitanorum asiatico” (pri justa azia imperio de la lusitanoj), de pastro Serafim de Freitas, sed la polemiko atingis la pinton per la publikigo de verko de la angla John Selden titolita “*De mare clausum*” (pri fermita maro) en 1635.

DE
IVSTO IMPERIO
LVSITANORVM
ASIATICO

*Auctore Doctore Fr. Serafino de Freitas Lusitano in Pinciana
Academia Vespertina in sacris Canonibus Cathedra an-
tiquissimo & Mercenarij munice.*

*Ad Philippum III. potentissimum Hispanicarum, & Insularum Monarcham
Non querens te Sola docet, nec laurus Phabi:
Fiat ☉ ex estra civitas nostra tibi.*



Cum Privilegio Castellae, & Lufaniae

Valledien: In Officina Henrici Masili Anno Vniuersita-
tis Typographi Anno MDCXXXV.

Kiel kuriozaĵo ni povas diri ke antaŭ ne longe oni trovis tion kio povas esti la plej frua repliko, tiun de la jezuita pastro Nikolao Bonaert, naskiĝinta en Bruselo en 1564. Malgraŭ la fakto ke Grotius havis plurajn replikojn, li ne respondis ilin, ĉar li estis devinta fuĝi el Nederlando, li ekziliĝis en Francio kaj perdis sian intereson pri la nederlandaj aferoj.

Serafim de Freitas naskiĝis ĉirkaŭ 1570 en Lisbono (Portugalia), poste li iris al Universitato de Koimbra kie li doktoriĝis pri eklezia juro en 1595. Poste, li translokiĝis al Valjadolido (Hispanio) kaj profesiis en religia ordeno. En la Valjadolida universitato li eklaboris kiel profesoro kaj en Koimbra li doktoriĝis, ĉar tio estis necesa por atingi katedron en Hispanio. Li forpasis en Valjadolido la 11-an de junio 1633. La repliko de Freitas al broŝuro de Grotius estas tiel detala ke vere estas malfacile resumi la 18 ĉapitrojn, do ni studos nur lian vidpunkton pri la internacijuraj temoj. Li asertas ke *“la jurisdikcio kaj protektado de la maroj apartenas al suvereno..... tamen, ĉiuj agnoskas ke la proprieto de la maroj estas “nullius” (nenies), sed tiu malsimileco inter proprieto kaj jurisdikcio estas banala vorto , ĉar ambaŭ enhavas la saman koncepton”*. Nun ni devas diri ke la doktrino de Freitas ĉirilate estas malmoderna kaj anakronisma.

Pri la internaciaj traktatoj, Freitas prave asertas ke ili devigas ĉiam, escepte se ili neas la naturan kaj dian juron. Pro tio li studas la Buleojn de Papo Aleksandro la 6-a kaj li opinias ke tiu decido estas deviga por Kastilio (au Hispanio poste) kaj Portugalio, sed ne por aliaj popoloj. Freitas opinias ke, pro la fakto ke neniu el la reprezentantoj de aliaj popoloj en Romo kontraŭdiris la papajn buleojn, implicite ili konsentis.

Kvankam Grotius neas la validecon de la papaj buleoj, Freitas nur neas la tempan povon de la papoj, tamen li agnoskas ke la uzo de la spirita aŭtoritato bezonas samtempe tempan povon. Krome, por Freitas la politika povo devenas de Dio, kiu konferis ĝin al la reĝoj, por ke ili agu je lia nomo.



Kial, do Freitas defendas la fermitan maron?

Freitas iusence sekvas la doktrinion de Vitoria pri la rajto de komunikado, tamen, por kontraŭdiri la doktrinion de Grotius li defendas la fermitajn marojn pro la jenaj kialoj:

1.-Historia bazo.

Dum la epoko de Freitas, Portugalio kaj ĝiaj transmaraj posedaĵoj, de 1581 ĝis 1640 estis regataj de la hispanaj habsburga dinastio, pro la natura estingo de la portugala Avis dinastio.

Tiam, la menciita historia ibera kunigo estis jam tre debatita ĉu ene de la ibera duoninsulo, ĉu ekstere.

Laŭ la historio, port la malkovro de Ameriko en 1492, Kristoforo Kolombo revenis en Hispanion por informi al la t.n. “katolikaj gereĝoj” Elizabeto la 1-a el Kastilio kaj Ferdinando la 2-a el Aragono, reĝojn el Hispanio, sed antaŭ ol tio, li atingis Lisbonon kaj vizitis la portugalan reĝon Johano la 2-a. Tiam komenciĝis intensa diplomatia negocado inter ambaŭ kronoj, por fiksi kiu kontrolos la malkovritajn terojn.

La 11-an de aŭgusto 1492, estis elektita Papo la hispana Rodrigo de Borgia, nomata poste, Aleksandro la 6-a, kiu havis tre bonajn rilatojn kun la hispanaj gereĝoj. Tiuj bonegaj rilatoj estis pro la fakto ke la gereĝoj favoris multe la familion de la papo post kiam Aleksandro la 6-a rajtigis ilian geedziĝon malgraŭ la fakto esti duavicaj kuzoj. Pro tio, post peto de Elizabeto kaj Ferdinando, la papo koncesiis la t.n. “aleksandrajn buleojn”, inter ili du Buleojn “*inter caetera*”, de majo 1493, unu jaron post la malkovro de Ameriko, por evangelizi kaj komerci en la novaj teroj. La “katolikaj gereĝoj” sendis fine de majo, peton al sia ambasadoro en Romo por atingi plej favoran buleon, li sukcesis per la 2-a buleo “*Inter caetera*”. Tiu ĉi buleo atingis Seviljon la 19-an de julio, kaj tuj la reĝoj sendis ĝin al Kristoforo Kolombo la 4-an de aŭgusto.

La dua buleo estis pli klara ol la unua, kaj difinas la teritoriojn koncesiitajn al la hispanaj reĝoj, laŭ la limo de norda ĝis suda poluso, por teroj kaj maroj okcidenten. Tiuj buleoj koincidis kun la intertraktado inter Hispanio kaj Portugalio post la unua vojaĝo de Kristoforo Kolombo al Ameriko, kaj kiam la portugaloj bezonis scii kiujn terojn kaj marojn devus regi. Tiuj

intertraktadoj finis per la subskribo, la 7-an de junio 1494 de la *Traktato de Tordesillas* (urbeto apud Valjadolido) por kiu ambaŭ potencoj fiksas siajn zonojn pere de meridiano situanta je 370 leŭgoj okcidente de Verda-Kaba insularo, okcidenten por Hispanio kaj orienten por Portugalio, sen plu mencii la aleksandrajn buleojn. Subskribis tiun traktaton la reprezentantoj de la gereĝoj el Hispanio kaj aliflanke tiuj el la reĝo Johano la 2-a el Portugalio, kaj malpermesis la liberan navigadon al eksterlandaj ŝipoj.



Do, la regado de la maroj en tiuj jarcentoj estis ŝlosila por mastri la komercon, riĉaĵojn kaj eĉ regi la mondon, kaj Grotius defendis la liberan komercon, fundamentan por la nederlandanoj kaj fiŝkaptadajn aktivaĵojn kiujn li konsideris neakordigeblajn kun la koncepto pri fermitaj maroj

Aliflanke, en la komenco de la 16-a jarcento, la hispana krono regis la monopolon de la komerco kun siaj kolonioj, okcidenten, kaj la malpermeso al la eksterlandanoj komerci kun la amerikaj posedaĵoj, alportis kontrabandon kaj neleĝan komercon, per piratoj kaj korsaroj.

Hispanio kaj Portugalio ne volis aŭskulti, jam en la 17-a jarcento, kelkajn saĝajn konsilojn de kompetentaj kaj lojalaj regatoj, kiel tiuj de la fama hispana diplomato Diego Sarmiento, kiu en 1616 skribis leteron al reĝo Filipo la 3-a el Hispanio kaj 2-a el Portugalio, konsilante forlasi tiun kontraŭjuran praktikon.

Fine, kvankam la intelekta diskonigo de la verko de Serafim de Freitas ne trovis la gravecon de tiu el Grotius, tiaj argumentoj signifas grava mejloŝtono por kompreni la pensmanieron de la hispana monarĥio dum la 16-a kaj 17-a jarcentoj.



103a UNIVERSALA

LISBONO 2018
28 JULIO – 4 AŬGUSTO



KONGRESO

de ESPERANTO





Konstitucia Tribunalo
de Portugalio.
Sidejo en Lisbono kaj membroj.



EKSTERLANDAJ NE-PLENAĜULOJ NE-AKOMPANITAJ EN EŬROPO

 **José María Rodríguez Hernández
Hispanio**

Ĉiu-tage aperas sur-televide similaj informoj: miloj da homoj el Afriko au Azio provas trapasi la Mediteranean Maron por veni en la eŭropajn marbordojn, cele atingi politikan azilon aŭ, pli ofte, plibonigi siajn viv-kondiĉojn. Se por plenaĝulo tiu vojaĝo, kiu povas daŭri eĉ kelkajn jarojn, jam estas tragedia, estas terure image ĉi katastrofan situacion kiam la elmigranto estas infano ne-akompanita de gepatroj aŭ de respondecaj plen-aĝuloj.

Laŭ datumoj havigitaj de EUROSTAT¹ en la jaro 2015 90.000 infanoj ne-akompanitaj petis azilon en Eŭropo. En tiu jaro la nombro kreskis ĉar nur kelkaj jaroj antaŭe, tio estas de 2008 ĝis 2015, ne pli ol 10.000 infanoj alvenis en Eŭropon. La vojoj por la enmigrado de ĉi tiuj infanoj ŝanĝiĝis dum la lastaj jaroj. Ĝis la fino de 2002, ili ĉefe elmigris kaŝitaj ene de grandaj ŝipoj trapasantaj la ĝibraltaran markolon aŭ kaŝitaj sub transportkamionoj venitaj de la nord-afrikaj hispanaj urboj Ceŭto aŭ Melilo. Tamen, komence de la jaro 2003 la migrantaj ne-plenaĝuloj ekarivis en la eŭropajn marbordojn per malgrandaj boatoj el Nord-Afriko.

La ŝtataj kontroloj favoris la aperon de mafioj kiuj ebligas, kontraŭ alta mon-pago, trapasi la land-limojn. Tiel, la

¹ La Eŭropa Statistika Oficejo, mallonge Eurostat, estas la oficejo pri statistiko de la Eŭropa Unio. Ĝia sidejo estas en Luksemburgio.

kostoj kaj foje eĉ la vivo-riskoj por la elmigrantoj kreskis kaj tio estas speciale kruela se ni parolas pri ne-plenaĝuloj.

La ne-plenaĝuloj kiuj estas ne-akompanitaj en fremda lando troviĝas en unu el la jenaj situacioj:

- a) Ne-plenaĝuloj kiuj troviĝas en fora lando tute leĝe, kun la konsento de la gepatroj aŭ de leĝaj reprezentantoj, ekz. tiuj infanoj kiuj vojaĝas eksterlanden por studi aŭ lerni lingvojn dum kelke da tempo. La manko de protekto en ĉi tiu kazo tute ne ekzistas.
- b) Ne-plenaĝuloj akompanitaj de neniu homo prizorganta ilin. Oni devas konsenti, ke la manko de protekto nur ekzistas en ĉi tiu dua situacio.

Leĝa Protektado de Plenaĝuloj ne-akompanitaj.

Laŭ la propra difino, du karakteroj provokas vundeblon en tiuj homoj. Temas pri eksterlandanoj kaj krome ili estas ne-plenaĝuloj. Pro sia aĝo ili ne rajtas eniri en la labor-mondon, do, ofte, ili devas supervivi ene de teruraj viv-kondiĉoj, labor-ekspluatado aŭ eĉ seks-ekspluatado, ĉi tio oftas se temas pri knabinoj kiuj eniras ene de mafiaj retoj. Pro tio, oni devas diri unualoke, ke la ĉefa celo se oni parolas pri enmigrado de ne-plenaĝuloj ne estas efektiviĝi la enmigrad-politikojn, sed male, certigi la superan intereson de la infanoj².

² Ĉi tiun principon proklamis la Eŭropa Tribunalo de Homaj Rajtoj en sia juĝoj de la 9-a de junio 1998 (afero: Bronda kontraŭ Italio) kaj la 16-a de novembro 1999 (afero: E.P. kontraŭ Italio).

Tiu principio ankaŭ aperas sur la artikolo 9.1 de la Konvencio pri Rajtoj de la Infanoj, aprobita en la jaro 1989, kiu tekstas jene:

Artikolo 9.

- 1. La ŝtatoj zorgos, ke la infano ne estu apartigita de siaj gepatroj kontraŭ ilia volo, escepte kiam la kompetentaj aŭtoritatoj, kaj kun la eblo revizii la decidon jure, konforme al la leĝo kaj laŭ la aplikebla proceduro, decidos, ke tiu apartigo estas necesa akorde kun la supera intereso de la infano. Tiu decido povas esti necesa laŭ konkretaj okazintaĵoj, ekzemple, kiam okazis mistraktoj aŭ ne-zorgado fare de la gepatroj aŭ kiam ĉi tiuj loĝas disigitaj kaj estos necese adopti decidon pri la rezid-loko de la infano.*

Do, kiu ajn decido de ŝtato rilate infanon devas serĉi unualoke, la supreman intereson de la infano mem kaj ne nur la efektivigon de la leĝo pri enmigrado.

Same asertas la Eŭropa Ĉarto de la Rajtoj de la Infanoj, de 1992, kies artikolo 8.14 deklaras, ke ĉiun familian, administracian aŭ juran decidon rilate infanon, devas gvidi, kiel ĉefa celo, la defendo kaj prizorgo de la interesoj de la infano. Alie, nek la Internacia Konvencio, nek la Eŭropa Ĉarto distingas ĉu la infano estas leĝa rezidanto en ŝtato aŭ ne. Pro tio, tiuj interesoj celataj de kiu ajn administracia decido estas pli gravaj ol la diskutoj pri la civitaneco aŭ ne-civitaneco de la ne-plenaĝulo. Do, ili estas aplikeblaj ĉiu-okaze, kondiĉe ke la infano estu sur la teritorio de la ŝtato, akompanita aŭ ne. Ne estas malofte trovi situaciojn, kiam ŝtatoj, cele garantii la interesojn de la infano, prenas sur si la patran aŭtoritatecon rilate la infanon kaj nuligas tiun rajton al la

veraj gepatroj, se ili damaĝis la idaron aŭ se la bonfarto de la infano ne estas certigita ĉe la familia etoso.

Kiu estas ne-plenaĝulo ne-akompanita ?

Por kompreni ĝuste kiu estas ne-plenaĝulo ne-akompanita, unualoke, estas necese klarigi kiu estas ne-plenaĝulo kaj kion signifas “ne esti akompanita”.

1. Ne Plen-aĝeco.

Estas ne-plen-aĝulo, aŭ minorulo, tiu homo, kiu laŭ sia propra nacia juro, estas jure ne-plenaĝa, tio estas sen plena agopovo el la jura vidpunkto. Tio estas, eksterlandano estos plenaĝulo, aŭ ne, laŭ la leĝoj de sia civitana ŝtato, ne laŭ la leĝoj de la ŝtato kie li loĝas. Se ne estas eble koni la civitanecon de la homo, kaj tio okazas ofte, tiam oni devos apliki la leĝojn de la ŝtato kie troviĝas la ne-plenaĝulo.

Jen konkreta kazo: nikaragva 17-jaraĝulo ne-akompanita troviĝas en Portugalio. Ni sciu, ke laŭ la nikaragva civila juro, plenaĝecon oni atingas je la 16-a vivo-jaro. Do, li tute ne devos esti konsiderata ne-plenaĝulo ne-akompanita, malgraŭ la fakto, ke en Portugalio plenaĝecon atingas 18-jaraĝuloj.

Tamen, kio okazas se la plenaĝecon oni atingas en la civitana ŝtato je la 19-a vivo-jaro aŭ eĉ poste? Ne temas pri teoria situacio, ŝtatoj kiel Barejno, Japanio, Honduro aŭ Madagaskaro fiksas la plenaĝecon je la 19-a vivo-jaro kaj en kelkaj usonaj ŝtatoj eĉ je la 21-a. En Eŭropo estus necese priatenti la Eŭropan Ĉarton de la Rajtoj de la Infano de la jaro 1992, kiu disponas en sia artikolo 2-a, ke estos konsiderata infano

ĉiu homo ĝis sia 18-a vivo-jaro, escepte kiam la nacia leĝaro de lia ŝtato fiksas pli antaŭan limo-aĝon.

Tio estas, la eŭropa leĝaro admisias nur la malpliigon de la plenaĝeco sub la 18-jara limo, tamen ĝi ne konsideras la eblan pliigon post tiu aĝo. Laŭ kelkaj aŭtoroj ĉi tiu afero provokus diskriminacion, tiel, por unuigi la kriterioj pri ĉi tiu afero, la Eŭropa Parlamento mem deklaris en la rezolucio de 12-a de septembro de 1993, ke oni devas konsideri infanon al tiuj homoj kiuj ne estas 18-jaraĝaj, sendepende de la nacia leĝo de la ŝtato kies la homo estas civitano. Same, en kelkaj naciaj leĝoj aplikeblaj al eksterlandanoj, ekz. tiu de Hispanio, oni admisias la rajton de la eksterlandanoj loĝantaj en tiu ŝtato alvenigi tien iliajn familianojn malpli ol 18-jaraj, sendepende de la konsidero aŭ male, de tiuj homoj kiel plenaĝuloj laŭ la nacia origina leĝaro. Multaj aliaj eŭropaj direktivoj fiksas la plen-aĝecon je la 18-a vivo-jaro.

2. Esti eksterlandano.

En Eŭropo, rilate la konsideron kiel eksterlandano, estas necese pri-atenti du situaciojn:

- a) Tiuj eksterlandanoj kiuj estas civitanoj de iu ŝtato de la Eŭropa Unio, de Eŭropa Ekonomia Areo³ aŭ de Svisio.
- b) Ceteraj eksterlandanoj.

El la eŭropa vidpunkto, se paroli pri eksterlandaj ne-plenaĝuloj ne-akompanitaj, ili estos nur de tiuj lastaj ŝtatoj. Do,

³ Islando, Norvegio kaj Lihstentejno.

plen-aĝuloj de Eŭropa Unio, de Eŭropa Ekonomia Areo aŭ de Svisio ne estas eksterlandanoj.

3. Ne Akompanitaj.

Oni konsideras “ne-akompanita” al tiu ne-plenaĝulo enirinta en Eŭrop-unian teritorion sen la prizorgo de gepatroj, plenaĝuloj aŭ de kuratoro. Same, tiu kiu eniris en Eŭropon akompanita de unu el tiuj plenaĝuloj, tamen poste forlasita de li.

Oni ne povas konsideri ne-akompanitaj al tiuj infanoj kiuj alvenas en Eŭropon, kun la deviga vizo, por studi aŭ por lerni lingvojn. Same, tiuj infanoj kiuj alvenas en Eŭropon dank'al programoj organizitaj de ŝtatoj, regionaj instancoj, ne-registaraj organizoj aŭ privataj fondaĵoj, kiuj faciligas la restadon de ne-plenaĝuloj en Eŭropo dum kelke da tempo cele la sekvon de studoj, kuracista interveno, pacemaj vakancoj⁴, ktp.

Laŭ-leĝa Agado rilate eksterlandajn ne-plenaĝulojn ne-akompanitajn en Eŭropo.

1. Re-enhejmigo.

La fundamenta celo de ĉiu administracia aŭ jura decido rilate ĉi tiujn infanojn estas atingi la superan intereson de la ne-plenaĝulo, ĝi devas esti la ĉefa akso de kiu ajn decido. Laŭ ĉi tio, la supera intereso de la infanoj estas la re-enhejmigo apud lia familio.

⁴ Ekzemple, en Hispanio regionaj administracioj kun la kunlaboro de ne-registaraj organizaĵoj faciligas la alvenon dum somero de centoj da infanoj de la eksa hispana kolonio Okcidenta Saharo.

La Rezolucio de Eŭropa Unio de la 26-a de julio de 1997 deklaras, ke la ne-plenaĝulo rajtas esti apud sia familio, kiu respondeciga pri la bezonoj de la infano. Tamen, en kelkaj ŝtatoj⁵, antaŭ ol preni kiun ajn decido, la infano rajtas esti aŭskultata, tio estas garantiata de la artikolo 12-a de la Konvencio de la Rajtoj de la Infano.

Do, la unua decido rilate ne-plenaĝulojn ne-akompanitajn ne povas esti la forpelo en la ŝtaton tra kiu li eniris en Eŭropon, male, oni devas kontakti kun la naciaj aŭtoritatoj de la ŝtato de la infano kaj tiamaniere trovi lian familion. Tamen, pro la fakto, ke oni devas serĉi ĉiumomente la superan intreson de la infano, la re-enhejmigo de la minorulo devas okazis nur se tiel oni respektas tiun ĉefan normon. Do, li ne devos esti re-enhejmigita se ekzistas riskoj por la vivo aŭ por la fizika aŭ mensa bonfarto de la minorulo.

Ĉi tio ne signifas, ke oni devas kompari la ĝuantajn vivkondiĉojn de la infano kiam li revenos hejmen kun tiuj kiujn li ĝuos se li restas eksterlande. Ĉi tiuj cirkonstancoj ne povas esti konsiderataj se paroli pri la re-enhejmigo de la infano.

Tiel, se paroli pri reveno hejmen, tiu estos la unua ebla agado rilate eksterlandajn infanojn ne-akompanitajn, tamen tio devas okazi nur se ekzistas sufiĉaj garantioj rilate la respektadon de la rajtoj de la infano kaj post koni tutcerte, ke la familio akceptos kaj prizorgos lin, aŭ se tio ne estas certigata, ke la oficialaj instancoj de la hejma ŝtato prizorgos lin.

⁵ Ekzemple en Hispanio, infano pli aĝa ol 12-jaroj rajtas esti aŭskultata ĉe tribunalo, se oni pridebatas aferojn gravajn por lia estonteco.

2. Restado en Eŭropo.

Se ne estas eble koni la originan ŝtaton de la minorulo, se la familio ne estas trovata aŭ se jam trovita la familio de la infano, ili ne akceptas la re-enhejmigon aŭ la origina ŝtato ne povas prizorgi lin, oni devas forlasi la ideon re-enhejmigi la neplenaĝulon.

Estos necese tiam, deklari la “manko de protektado de la infano”, tiu situacio okazas kiam la respondeculo de tiu prizorgo ne povas aŭ ne deziras efektiviĝi lian respondeciĝon. Tiam la ŝtato, aŭ kelka regiona aŭ eĉ urba instanco, respondeciĝos pri la prizorgo de la minorulo kaj oni garantios tiamaniere, la materiajn kaj moralajn bezonojn de la infano.

Ĉi tiu deklaro de manko de protektado okazas *ministerio legis*, fare de la publika administracio kiu respondeciĝas pri la protektado de infanojn, foje eĉ oni devas priatenti la konsideron de la publika prokuroro.

La ĝenerala regulo baziĝas sur la fakto, ke kiam estas tute maleble re-enhejmigi la minorulon, la akceptanta ŝtato devas preni la rimedojn necesajn por protekti lin. Ĉu estas pli konvene faciligi la adoptadon de la infano fare de familio aŭ ĉu lasi la infanon ĉe institucio? Nu, se temas pri minorulo konanta la lingvon kaj la kutimojn de la akceptanta ŝtato estas pli konvene faciligi la adoptadon ĉe familio, tamen se paroli pri eksterlandaj ne-plenaĝuloj, la plej ofta sperto estas akceptigi lin ĉe oficiala institucio aŭ ĉe ne-registara organizo, akorde al decido de la administracio, pro la fakto, ke tiuj minoruloj alvenas en Eŭropon ne konanta la lingvon kaj kun la tuja necese revenigi al li en la lernejon, ni sciu, ke la migrada vojaĝo daŭras eĉ jarojn. La fina

celo estas havigi al tiu ne-plenaĝulo la necesajn spertojn por ebligi lian sendependan vivon post lia 18-a vivo-jaro.

Kiam la infano estas akceptata ĉe institucio, tiam la administracio devas havigi al li rajtigilon por resti tute leĝe en la ŝtato kun la celo ebligi la atingon de la civitaneco de la akceptanta ŝtato kiam li estos 18-jaraĝa. Tamen, oni devas averti, ke tiu rajtigo ne signifas la ĉeson de la serĉado de la familio en la origina ŝtato por ebligi ontan re-enhejmigon, se tio estas favora al la suprema intereso de la infano. Tiel, la oficiala deklaro de la manko de protektado de la minorulo kaj la rajtigo resti leĝe en la akceptanta ŝtato ne devas finiĝi la serĉadon de la familio en lia nacia ŝtato, kvankam tio verdire okazas ne tre ofte.

GALERIO DE ILUSTRAJ ESPERANTISTAJ JURISTOJ



Ralph Lindsay HARRY
(Aŭstralio 1917 – 2002)

Aŭstralia juristo kaj diplomato. Li esperantiĝis en 1937. Li estis aŭstralia ambasadoro en Sud-Vjetnamio, Germana Federala Respubliko kaj ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Li aktivis en Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj kaj kontribuis al ties organo *Internacia Jura Revuo*. Li sukcesis persvadi al UN kaj al NASA enmeti mesaĝon ankaŭ en esperanto en ora disko de la kosmosondilo *Voyager*.

Mallongaj Juraj Informoj

§ La Komisiono de Eŭropa Unio uzos drastajn rimedojn por defendi la bonan aerkvaliton

Kun la celo protekti la civitanojn kontraŭ la atmosfera poluado, la Komisiono prenis drastan decidon por alfronti la poluadon kaŭzitan pro la industrioj, veturiloj, homa hejtado, aŭ agrikulturo.

Certe en la ŝtatoj de la Eŭropa Unio, la aerkvalito pliboniĝis dum la lastaj jardekoj, ofte danke al la klopodoj de la Unio kaj de la lokaj, regionaj kaj naciaj aŭtoritatoj, tamen la vivkvalito de multaj el la civitanoj de la Unio daŭre estas neakceptebla. La aerpoluado estas kaŭzo de kronikaj kaj gravaj malsanoj, kiel astmo, kardiovaskulaj problemoj eĉ pulmokancero. Per Decido titolita “ *La Eŭropo kiu protektas: pura aero por ĉiuj* ” adoptita la 18-an de majo 2018, la Komisiono prezentas la disponeblajn rimedojn por helpi la ŝtatojn rilate la lukto kontraŭ la atmosfera poluado.

La Komisiono emfazas la neceson kunlabori kun la membroŝtatoj per dialogo kun la koncernaj aŭtoritatoj kaj per disdonado de eŭropuniaj fondusoj por apogi la plibonigon de la aerkvalito. La Komisiono de la Eŭropa Unio ne nur rekomendas al Konsilio kaj Parlamento, sed ĝi devas atentigi la plenumadon de la eŭropunia leĝaro flanke de la membroŝtatoj. Pro tio, la Komisiono gvidas kaj helpas la membroŝtatojn por plibonigi la aerkvaliton kaj post la *Ministeria Pintkunsido pri la Aerkvalito* de la 30-a de januaro 2018, pro malobeo de ses membroŝtatoj, la

Komisiono decidis en majo denunci ĉe la Eŭropunia Kortumo al *Francio, Germanio, Hungario, Italio, Rumanio kaj Britio*. Tiuj ses membroj ne prezentis kredeblajn kaj efikajn informojn pri rimedoj por redukti la poluadon, ene de la fiksitaj limoj, de la leĝaro de la Unio (Direktivo 2008/50/CE).

La komisaro pri Medio, Karmenu Vella certigis ke la decido denunci antaŭ la Kortumo al tiuj ses landoj fariĝis nome de la eŭropanoj, ĉar tiu Komisiono protektas ilin. Siaflanke, la Komisaro pri Interna Merkato kaj Industrio S-ino Elzbieta Bienkowska, deklaris ke nur ni povos venki la batalon kontraŭ la atmosfera poluado se la aŭtomobila sektoro agnoskas sian agadon. La aŭtomobiloj “nulo elsendoj” estas la estonto, pro tio, intertempe, estas esence respekti la eŭropunian leĝaron, kaj la fabrikantoj kiuj ne plenumos tiujn normojn devas preni responson sur sin.

La Kortumo ĉiam agnoskis la rektan aplikadon de la eŭropunia jurordo, ĉar la eŭropa juro devas esti rekte aplikata al la membroŝtatoj kaj al la civitanoj, ĉar ĝi integriĝas en la internan jurordon de ĉiu membroŝtato. Nu, la Direktivoj pri medioprotektado, estas normoj kiuj ligas la membroŝtatojn rilate la atingendan rezulton, sed lasas al la naciaj instancoj la kompetenton elekti la formon kaj la rimedojn. Do, la ŝtatoj devas plenumi la celon, elektante libere la rimedojn. Pro tio, post pluraj avertoj dum 2016 kaj 2017, fine la 17-an de majo 2018 la Komisiono decidis denunci antaŭ la Kortumo tiujn ses ŝtatojn, kaj aprobis favore la informojn de aliaj kiel Ĉeĥio, Slovakio kaj Hispanio atingitaj post la Ministeria Pintkunsido pri aer kvalito de januaro 2018.

R.U.

§ Juĝo en Hispanio kie vacapo ĉefrolis

Diskonigita en Hispanio juĝo kie la nova komunikilo vacapo ludis gravan rolon. Tiel, iu decidis aperigi en sia vacapo ĝuste sur sia etikedo jenan frazon: “*Ne fidu pri D-ro XXX, li estas mallerta kuracisto*”.

Temis pri eksa partnero de tiu kuracisto kiu ne tre bone finigis rilaton kun li post kelkaj jaroj da komuna laboro en hospitalo. La menciita kuracisto, post legi tiun frazon, decidis plendi kontraŭ tiu homo, li konsideris, ke la frazo misfamigis lin kaj tio damnis lian nomon kaj honoron. La juĝisto akceptis la plendon kaj pravigis la plendanton. La diskonigita juĝo asertis, ke la rigardado de la persona etikedo sur vacapo estas publike alirebla, do ĉies konata. Tiel, malbona sen-fundamenta opinio kontraŭ tiu kuracisto eblas misfamigon kaj kompreneble ĉi tio povas damni la kuracistan karieron de la doktoro.

Tamen, la plej tikla afero de la juĝo, krom la mon-puno decidita de 2.000 euroj, estis la fakto, ke la juĝisto ordonis aperigi sur la etikedo de la vacapo de la kondmanito jenan tekston: *Pro juĝo estis kondmanita pro ne-legitima misfamigo de la honoro de la D-ro XXX.*




§ Paco inter Etiopio kaj Eritreo.

Eritrero kaj Etiopio ĵus subskribis kun-deklaron “pri paco kaj amikeco” en Asmaro, la eritrea ĉefurbo. Ene de la deklaro oni asertas, ke la *“milit-stato ekzistanta inter ambaŭ ŝtatoj jam finiĝis”*. La Prezidanto de la Eritrea Parlamento, S-ro Isaias Afwerki kaj la etiopia ĉefministro, S-ro Abiy Ahmed, subskribis la akordon, pere de kiu *“oni malfermas la pordon al nova erao de paco kaj amikeco, kiam ambaŭ popoloj kunlaboros por favorigi komunan kooperadon en politika, ekonomia, socia, kultura kaj sekureca politikoj”*.

Ambaŭ reprezentantoj renkontiĝis en Asmaro kaj inter la unuaj decidoj troviĝas, malfermi ambasadejojn en ambaŭ ĉefurboj, funkciigi aer-liniojn inter la du landoj kaj kreskigi la ekonomion de la eritreaj havenoj kun la kunlaboro de Etiopio, kiu ne posedas mar-aliron. Antaŭe Etiopio jam ekkontaktis kun aliaj landoj, kiel Somalio kaj Ĝibutio, cele disvolvigi sian propran mar-armeon.

Eritrero sendependiĝis el Etiopio en la jaro 1993, tamen la landlimaj konfliktoj favoris militon inter ambaŭ landoj inter 1998 kaj 2000, kun dekmilo da viktimoj. La milito finiĝis en la jaro 2000 dank'al la Akordo de Alĝero, kiu fiksas *“finajn kaj tut-validajn”* landlimojn inter Etiopio kaj Eritreo. Tamen, la ne-cedo de la urbo Badme al Eritreo fare de Etiopio estis la ĉefa kaŭzo de la milito.





Uzukapo

Temas pri la leĝa rajto akiri la propraĵon de bieno, teritorio aŭ simpla objekto per sen-interrompa kaj ne-kontestada okupado dum prudente longa periodo.

La vorto “uzukapo” venas el la latino lingvo: *usus capere*, tio estas, akiri ion sen plia titolo ol la sen-interrompa posedo dum longa tempo. Kio estas necesa por uzukapi ion?

- Unue, estas necese ĝui ion kiel posedanto. Alia posed-titolo (ekz. luanto) ne devenigas uzukapon.
- Estas necese posedi tion sen-interrompe dum prudente longa periodo. La diversaj naciaj leĝaroj fiksas tiun tempo-periodo kiu povas esti malsimila laŭ la diversaj objektoj: ne-moveblaĵo, objekto, ktp.
- Fine, dum tiu periodo la posedo devas esti ne-diskutata, tio estas, devas okazi nenia peto de alia homo, ĉu alia posedanto, ĉu la laŭ-leĝa propietulo, ktp.

Uzukapo povas deveni laŭ “bona fido”, ĝi estas ankaŭ konata kiel “ordinara uzukapo”. Ĉi-kaze, la posedanto devas posedi la propraĵon sen la deziro trompi iun, tio estas, ĉar li mem konsideras sin kiel la justa propietulo. Se okazas “malbona fido” aŭ “eksterordinara uzukapo” tiu posedo naskiĝis post delikto aŭ trompo, pro tio multaj naciaj leĝaroj ne permesas tiun “eksterordinaran uzukapon”. Eĉ la antikva eklezia juro

malpermesis ĝin, laŭ la antikvaj kanonoj, tiu posedo devenis el “peko”. Tiel, oni diras, ke *ŝtelaĵoj ne estas uzukapeblaj*.

En kelkaj ŝtatoj, inter ili Portugalio, ankaŭ ekzistas speciala uzukapo, kiu povus esti konata kiel “socia uzukapo”. Ĉi-kaze la posedanto efektivigas pere de tiu posedo socian rolon. Ekzemple, tiu kiu posedas, sed ne estas la proprietulo, bienon kiu produktas nutraĵojn kapablaj oferi viv-rimedojn al la familio de la posedanto. Tiel, la uzukapo reale havas specifan socian celon.

Pri la origino de ĉi tiu jura instituto, kelkaj aŭtoroj asertas, ke la fundamento de la uzukapo estas la neceso legitimi propriet-raĵtojn de tiu kiu aperas sen-diskute kaj dum multe da tempo, kiel posedanto de tiu objekto, oni celas, do, certigi jure tion kio estas publike agnoskita. Aliaj mencias la fakton, ke ankaŭ oni povas esti komprenata kiel puno kontraŭ tiuj proprietuloj kiuj rezignas aŭ forlasas sian posedaĵon kaj plenumas nenian agadon pro protekti ĝin kontraŭ alies posedo.

Partioj en la Uzukapo

- Uzukapanto: temas pri la partio kiu posedas ion sen-interrompe kaj sen-diskute dum tempo-periodo. Li devas ĝui sufiĉan kapablecon por esti posedanto.
- Titulara proprietulo de la akiraĵo uzukapita: temas pri tiu persono, fizika aŭ jura, kiu tenas rajton pri io, tamen ne plenumanta efektivajn funkciojn aŭ okupadon de tiu objekto aŭ bieno.

Tipoj de uzukapo

- Laŭ la objekto.

La sola kondiĉo de objekto por esti uzukapata estas troviĝi ene de la komerco de la homoj. Tio estas, ĉion kio povas esti aĉetata, vendata, luata, donacata, aŭ simile, oni povas uzukapi. Tiel, estas eble uzukapi bienojn, domojn, ter-pecojn kaj ankaŭ kiun ajn objekton. Ĝenerale la tempo-periodo necesa por efektiviĝi uzukapon dependas ĉu la objekto estas ne-moveblaĵo aŭ alia objekto.

- Laŭ la proksimeco de uzukapanto kaj titulara proprietulo.

Kelkaj naciaj leĝaroj, inter ili la hispana, diferencas ĉu la uzukapo okazas inter proksimuloj aŭ ne. Tio estas, estas necese pli da tempo por efektiviĝi uzukapon se la titulara proprietulo de la objekto ne loĝas proksime al ĝi kaj malpli da tempo se la proprietulo apudas al tiu objekto.

Ekde kiam apartenas leĝe la objekto al uzukapanto?

Nu, kiel dirite la efektiviĝo de uzukapo neprigas tempopasadon. Ĉi tiu periodo ne estas simila en ĉiuj naciaj leĝoj kaj eĉ malsimila rilate objektojn. La leĝa proprieteco komenciĝas post la tempo difinita de leĝo, tamen ĝi havas retroaktivan efikon ekde la momento kiam la uzukapanto ekposedis la objekton, ĉar nur tiamaniere oni povus legitimi jure ĉiujn agadojn, eĉ *a posteriori*, de la uzukapanto rilate la objekton.




Vidindaĵoj en Lisbono



El nia Gazetoteko

Aperis sur la numero 19
(1979) de *Internacia Jura
Revuo*.



***La Koncepto de Neŭtraleco en Internaciaj
Rilatoj kaj Internacia Juro***

***Prof. D-ro Ivo LAPENNA
(Universitato de Londono)***

1. Enkonduka Rimarko.

Kvankam oni multe skribas kaj parolas pri neŭtraleco, neŭtralismo kaj kunligitaj nocioj, tamen ankoraŭ regas sufiĉe da konfuzo kaj miskomprenoj, ŝuldataj parte al manko de tiurilataj scioj, parte al necese nekompletaj difinoj en vortaroj, kaj en Esperanto iomgrade al la influo de la respektivaj naciaj lingvoj ĉe kelkaj unuopuloj.

Kio, do, estas la ĝenerala signifo de la radikoj *neŭtra-a* aŭ *neutral-a*?

Etimologie ambaŭ radikoj devenas de la latina *neuter*, *-tra*, *-trum*, kiu en tiu lingvo signifas "neniu el la du". En Esperanto, same kie en kelkaj aliaj lingvoj, troviĝas du radikoj derivitaj el la sola latina por signi la du ĉefajn grupojn de nocioj kun malsamaj signifoj: *neŭtra*-a kaj *neŭtral*-a, kun iliaj respektivaj derivaĵoj. Laŭ Plena Ilustrita Vortaro, *neŭtr*-a signifas "esti tia, ke ĝi apartenas nek al unu, nek al alia el du kategorioj": en gramatiko "nek virseksa, nek inseksa" (ekz. "ĝi" estas neŭtra pronomo; neŭtra genro en kelkaj lingvoj); en kemio ĝi signifas "nek acida, nek baza" (neŭtra solvaĵo); en elektro "nek positiva, nek negativa" (ekz. korpo ne montranta kian ajn elektran fenomenon); en botaniko (kaj ĝenerale en biologio) ĝia senco estas "senseksa", aŭ "nehavanta difinitan sekson" (ekz. ĉe abeloj, formikoj, k.a.). Aliflanke, *neŭtral*-a havas en PIV du ĉefajn signifojn: (i) ne partoprenanta, nek volanta partopreni en diskuto, batalo, milito (neŭtrala lando, teritorio, ktp.), kaj (ii) foresto de kontrasto inter du fonemoj en iu fonetika ĉirkaŭo. La unua signifo implicas ankaŭ la sencon de "senpartia" kaj povas implici tiujn de "indiferenta" aŭ "nedifinita" depende de la kunteksto.

En tiuj naciaj lingvoj, kiuj posedas vortojn derivitajn el la latina *neuter*, *-tra*, *-trum*,

oni trovas aŭ ambaŭ vortojn, kiel en Esperanto, aŭ nur unu el ili. Ekzemple, en la itala ekzistas *neutro* kaj *neutrale* kun proksimume la samaj signifoj kiel en Esperanto. Ankaŭ en la angla estas du vortoj - *neuter* kaj *neutral-*, sed la signifoj ne tute respondas al la esperantlingvaj (ekz. en kemio la angla *neutral*, kaj ne *neuter*, estas uzata por indiki "nek acida, nek baza") La franca havas nur la adjektivon *neutre*, kiu ĝenerale respondas al ambaŭ Esperantaj vortoj, sed ĝi havas ankaŭ la substantivojn *neutralité* kaj *neutraliste*. Male, la rusa posedas nur la adjektivon *nejtraljnyj* kaj la kroata aŭ serba sole *neutralan*, kiu respondas al la *neŭtra* kaj al *neŭtrala* en Esperanto. Simile estas en aliaj naciaj lingvoj.

2. Resuma Historia Trarigardo.

Necesas distingi inter politiko de neŭtraleco en internaciaj rilatoj kaj neŭtraleco aŭ neutraligo kiel institucio de internacia publika juro. La unua certe estis konata jam en la plej malproksima pasinteco, en la temo de formiĝado de la unuaj ŝtatoj kaj, tre kredeble, eĉ en la antaŭa periodo de la tria organizo de la socio. La dua ekestis paralele kun la komenciĝoj kaj evoluo de la moderna Internacia juro, kvankam ĝia origino sendube troviĝas en la diplomaciaj rilatoj de la antikva ŝtatoj. Unu el la esencaj trajtoj

de la moderna Internacia Juro, aĝa proksimume nur kvar jarcentojn, estas ĝia karaktero de juro realiganta la rilatojn inter suverenaj kaj principe egalrajtaj ŝtatoj, bazita sur ilia eksplicita aŭ implicita komuna konsento. Ĉar tia koncepto de Internacia Juro, nome juro bazita sur la rekono de suverena egaleco, ne ekzistis en la antikveco, ankaŭ la nocio de neŭtraleco kiel jura institucio ne povis ekzisti. Eĉ kiel eksterjura kategorio neŭtraleco ne estis rekonita. En kazo de milito inter du ŝtatoj, la triaj ŝtatoj devis elekti inter la militantaj flankoj kaj fariĝi aŭ amikoj aŭ malamikoj de unu partio aŭ de la alia. Tio povis okazi per fakta ekmilito je unu flanko kontraŭ la alian, aŭ en malpli radikalaj formoj, ekzemple per mATERIA helpo. Tiu ĝenerale negativa starpunkto rilate neŭtralecon klare speguliĝis en la antikva mitologio, laŭ kiu eĉ la dioj ne estis neŭtralaj, sed partoprenis militojn helpante siajn fidelulojn de la du flankoj kun la celo venkigi ilin.

En la historio ja estas konataj kelkaj kazoj, en kiuj unuopaj ŝtatoj de la antikva epoko klopodis realigi politikon de neŭtraleco, sed la militantaj partioj neniam rekonadis tion.

En la mezepoko la situacio ne multe ŝanĝiĝis, sed en la lasta periodo de tiu

epoko la militantaj partioj ne plu rekte devigadis la triajn ŝtatojn elekti inter la du flankoj. Tamen, plu forestis klare formulitaj kaj jure rekonitaj rajtoj kaj devoj en la ligo kun la neŭtraleco. Ŝtato povis insisti, ke ĝi ne partoprenadis iun militon, kvankam ĝi helpadis unu flankon per mono, armiloj, trupoj kaj alimaniere kontraŭ la interesoj de la alia. Por eviti tion, ĉiam pli vastiĝadis la kutimo konkludi internaciajn traktatojn, kiuj malpermesadis al la partioj de la traktato en kiu ajn formo helpi la malamikojn de la alia partio en kazo de milito kun triaj ŝtatoj.

Meze de la 14-a jc. Aperis en Barcelono (Hispanio) la fama privata kolekto de kutimoj kaj reguloj de Marjuro, konata kiel *Consolato del Mare*, kiu interalie entenis la principon, ke en milittempo malamikaj varoj en neŭtralaj ŝipoj povas esti konfiskitaj, sed ke varoj apartenantaj al neŭtraluloj en malamikaj ŝipoj devas esti redonitaj al la proprietuloj (Britio aplikis tiun regulon ĝis la Krimea Milito de 1854).

Sub la influo de la menciitaj traktatoj pri neŭtraleco oni komencis ĉiam pli klare distingadi en la jura teorio inter vera kaj falsa senpartiecoj de triaj ŝtatoj en kazo de milito. Tiamaniere la koncepto de neŭtraleco laŭgrade evoluis en la 16-a jc. kaj komence de la 17-a jc., kiam Hugo Grotius publikigis sian fama *De Jure Belli*

ac Pacis (en 1625), ĝi jam estis rekonita kiel institucio de Internacia Juro. Necesita longa plia internacijura praktiko kaj teoria prilaborado antaŭ ol ĝi ricevis multifacetan nuntempan signifon.

La plua evoluo de la reguloj pri neŭtraleco en la 19-a jc., ŝuldiĝas al tri ĉefaj faktoroj: la starpunkto de Usono rilate neŭtralecon inter 1793 kaj 1818; la konstanta neŭtraligo de Svislando kaj Belgio; ka la t.n. Deklaro de Parizo de 1856, kiu entenis la principon "libera ŝipo - libera varo", la regulon ke neŭtralaj varoj en malamikaj ŝipoj devas ne esti alpropigitaj, kaj la regulon ke marblokado devas esti efektiva por esti jure rekonita. Tiu evoluo kondukis al du internaciaj konvencioj, kiujn akceptis la Dua Konferenco pri Internacia Juro, okazinta en Hago (Nederlando) en 1907. Unu estis la Konvencio V pri la Rajtoj kaj Devoj de Neŭtralaj Potencoj (Ŝtatoj) kaj Personoj en Surtera Milito; la alia estis la Konvencio XIII pri la Rajtoj kaj Devoj de Neŭtralaj Potencoj en Marmlito. Bedaŭrinde pluraj ŝtatoj, inte kiuj ankaŭ Britio, ne ratifis la du konvenciojn.

Same kiel multaj aliaj principoj kaj reguloj de Internacia juro, ankaŭ la neŭtraleco kiel jura institucio tiom suferis pro krudaj malobservoj dum la Unua kaj Dua Mondmilitoj

fare de la agresintoj, ke fine ĝi estis libervole kaj preskaŭ universale forlasita kaj anstataŭigita per kolektiva fortostreĉo

defendi sian nacian ekziston kaj individuan liberecon. Tiuj eventoj kaŭzis ŝanĝojn en la konceptado de neŭtraleco kaj necesigis juran reformuligon de la principo.

Kiel oni vidas, neŭtraleco kaj internaciajura institucio ekestis kaj evoluis preskaŭ ekskluzive en Eŭropo aŭ lige kun eŭropaj ŝtatoj. Tipaj ekzemploj estas tiuj de Svislando, Belgio, Luksemburgo kaj Aŭstrio.

3. Tipaj Ekzemploj.

La Svisa Konfederacio, rekonita en 1648 per la Vestfaliaj Traktatoj, ekde tiam strikte aplikis sian tradician politikon de neŭtraleco. Tio, tamen, ne malhelpis Francion interveni kaj altrudi al Svislando en 1798 novan Konstitucion, laŭ kiu Svislando ĉesis esti konfederacio kaj fariĝis unueca ŝtato sub la nomo Helvetia Respubliko. Krome, Francio ligis ĝin al si per traktato de alianco. Nur en 1814 Svislando denove fariĝis konfederacio kaj la 20-an de marto 1815, dum la Kongreso de Vieno, Britio, Aŭstrio, Francio, Portugalio, Ruslando, Hispanio, Svedio kaj Pruslando subskribis Deklaracion, per kiu la konstanta neŭtraleco de Svislando estis rekonita kaj

kolektve garantiita. La 27-an de marto 1815 Svislando aliĝis al la Deklaracio, kaj la Fina Akto de la Kongreso de Vieno (1815) en art. 84 konfirmis tiun juran situacion. Per aparta Akto de la 20-a de novembro 1815, post la definitiva malvenko de Napoleon, la tiamaj grandaj potencoj rekonfirmis ĝin. Tiamaniere la svislanda politiko de neŭtraleco ricevis ankaŭ internacijuran rekonon kaj garantiojn: Svislando fariĝis neŭtralligita ŝtato. En Internacia Juro tio signifas, ke la sendependenco kaj integreco de tia ŝtato estas garantiitaj por la tuta estonteco per internaci-jura dokumento, dum, aliflanke, la koncerna ŝtato devontigas sin neniam ekmiliti kontraŭ kiun ajn alian ŝtaton krom en kazo de sindefendo, kaj neniam akcepti tiajn internaciajn obligaciojn (sindevontigojn), kiuj povus nerekte impliki ĝin en milito. Svislando konstruis fortikaĵojn kaj kreis fortan armeon, fakte tutpopolan armeon por defendi sian neŭtralecon. Ekde 1815 ĝi ne nur strikte observis, sed ankaŭ sukcesis observigi sian konstantan neŭtralecon, internacie garantiitan. Dum la milito inter Francio kaj Pruslando ĝi senarmigis en 1871 la tutan francan armeon de 80.000 soldatoj kiuj rifuĝe eniris ĝian teritorion, kaj gardis ilin ĝis la finigo de la milito. Dum la du grandaj mond-militoj Svislando, same tiel, sukcesis resti neŭtrala.

Belgio fariĝis konstante neŭtralgita en la momento de sia estiĝo kiel sendependa ŝtato en 1831. Ĝian neŭtralecon garantiis la kvin grandaj potencoj -Aŭstrio, Britio, Francio, Pruslando kaj Ruslando- per la Londona Traktato de la 15-a de novembro 1831. Aldone, Nederlando rekonis kaj garantiis ĝian neŭtralecon per la Traktato de Londono de la 19-a de aprilo 1839. Kiel konate, en 1914 Germanio, malobservis la neŭtralecon de Belgio kaj invadis ĝian teritorion por ataki Francion. Post tiuj spertoj Belgio postulis eksiĝon el stato de neŭtralgita ŝtato dum la Konferenco de Versailles, kaj la grandaj potencoj konsentis. Por la aliĝo de Belgio al la Pakto de Lokarno (1925) ĝi en ĉiu okazo ĉesis esti neŭtralgita. Sed kiam la ŝanĝita politika situacio en Eŭropo klare indikis, ke la nazia Germanio planas agreson, interalie ankaŭ per la denonco (eksiĝa averto) de la Traktato de Lokarno, ankaŭ Belgio petis esti liberigita de siaj devoj laŭ tiu traktato kaj samtempe donis restriktan interpreton de siaj devoj kiel membro de la Ligo de Nacioj, ĉio-ĉi kun la celo eviti implikiĝon en kazo de milito. Tio estis komprenita kiel reveno de Belgio al konstata neŭtraleco. Tamen, plian fojon tion ne helpis kaj la naziaj armeoj invadis ĝian teritorion.

Nuntempe Belgio estas unu el la fondintoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj ĝi ankaŭ apartenas al la Nordatlantika Alianco, tiel ke ĝi ne plu

povas esti rigardata kiel konstante neŭtrala aŭ neŭtralgita.

Similan sorton havis Luksemburgo, kiu estis neŭtralgita per la Traktato de Londono de 1867. Aŭstrio, Britio, Francio, Nederlando kaj Luksembrugo, Italio, Pruslando kaj Ruslando estis la garantiantoj, dum Belgio, pro sia stato de neŭtralgigo, ne subskribis la garantion. Same kiel en la kazo de Belgio, en 1914 Germanio invadis Luksemburgon kaj tiel malobservis ĝian neŭtralecon kaj siajn proprajn garantiojn.

La sola grava kazo de neŭtralgigo post la Dua Mondmilito estas tiu de Aŭstrio. Rezulte de la Traktato de la 15-a de Majo 1955 Aŭstrio denove fariĝis sendependa ŝtato, kiu devontigis sin entrepreni la necesajn paŝojn, por ke ĝia neŭtraleco estu internacie rekonita. La Konstitucia Leĝo efektive proklamis la konstantan neŭtralecon de Aŭstrio kaj ne nur la grandaj potencoj, sed ankaŭ aliaj ŝtatoj rekonis tion. Tiamaniere Aŭstrio fariĝis neŭtralgita ŝtato.

4. Politikaj kaj Juraj Signifoj.

Nun necesas doni kelkajn klarigojn pri la esencaj signifoj de la esprimoj "politiko de neŭtraleco", "neengaĝigo", "konstanta neŭtraleco", "neŭtralgigo" kaj "neutralismo"

kiel fakaj terminoj en Internacia politiko kaj Internacia juro.

Politiko de neŭtraleco estas jure nedeviga, fakta aŭ deklarita, senpartieca sinteno de ŝtato rilate ian internacian situacion, malkonsenton aŭ konflikton, inkluzive militon. Ĉar la koncerna ŝtato ne estas jure ligita, ĝi povas ĉiumomente libere ŝanĝi sian politikon kaj preni pozicion neneŭtralan, nome politike apogi iun el la flankoj aŭ subteni difinitan solvon por konflikta situacio. Estas vero, ke en la nuntempaj internacij rilatoj funkcias ankaŭ politikaj normoj de interŝtata konduto, bazitaj sur reciprokaj politikaj koncedoj - kaj tiuj normoj povas kelkfoje aplikiĝi al politiko de neŭtraleco - sed la politikaj normoj ne estas normoj de Internacia juro. Tial unuflanka ŝanĝo de la politiko de neŭtraleco ne estas malobservo de Internacia juro.

Kvankam jure nedevita, tamen la politiko de neŭtraleco en kazo de milito devas esti respektata de la militantaj partioj kaj kaŭzas internacijurajn sekvojn dum la koncerna ŝtato mem observas tian politikon. Svedio sukcesis respektigi sian politikon de neŭtraleco dum la Dua Mondmilito, sed Norvegio, Danlando, Nederlando, Belgio k.a. ŝtatoj, kiuj tuj komence de la milito, en septembro 1939, deklaris sian neŭtralecon

kaj oficiale komunikis la deklaron al la militantaj ŝtatoj, ne sukcesis. Alia afero estas la demando, ĉu la politiko de neŭtraleco estas etike pravigebla kaj prudenta en kazo de preskaŭ universala milito, en kiu la agresa flanko, se sukcesa, kompete detruos la ekziston mem de la alia flanko kaj facile englutos ankaŭ ĉiujn neŭtralulojn.

Post la Dua Mondmilito formiĝis aparta tipo de politiko de neŭtraleco, konata nun kiel "neengaĝiĝo". Ĝia ĉefa iniciato kaj nun apoganto estas la Prezidento de SFR Jugoslavio, J. Broz-Tito, kiu sukcesis arigi ĉ. tiu koncepto konsiderindan nombron da ŝtatoj. La neengaĝiĝo rilatas nur al la du grandaj politikaj-militaj blokoj gvidataj de la du superpotencoj: tiu de la Nordatlantika Traktato ĉepite kun Usono, kaj tiu de la Varsovia Pakto sub la rego de Soveta Unio. Pro la heterogeneco de tiu grupo de ŝtatoj, ilia fakta politiko koncerne multajn demandojn de la monda politiko, eĉ rekte tuŝantajn la neengaĝiĝon, ofte diverĝas kaj kaŭzas problemojn. Ekzemple, Kubo apartenas al tiu grupo, sed ĝia fakta milita interveno en Afriko estas klare kontraŭa al la eksplicite deklaritaj principioj de neengaĝiĝo. Ankaŭ ne engaĝiĝo, kiel aparta formo de iaspeca neŭtraleco, en multaj kazoj fakte malneŭtrala neŭtraleco estas jure nedeviga, kaj en kiu ajn momento ne engaĝita

Ŝtato povas forlasi la grupon kaj aŭ aliĝi al unu el la blokoj aŭ konduki sian propran, sendependan politikon de neŭtraleco.

Neŭtralismo estas nova termino, enkondukita antaŭ nelonge, per kiu kelkaj politikistoj kaj politiksciencaj specialistoj nomas pli nuanciitan nenegaĝigon. Ĝi indikas pli longdaŭran politikon de iu ŝtato neimplikiĝi en kiun ajn konflikton aŭ defendan aliancon.

La politiko de neŭtraleco povas konduki al formala unuflanka jura akto, per kiu ŝtato oficale deklaras sian konstantan neŭtralecon. Plej taŭge tio estas farata per regulo en la konstitucio. Aŭstrio, kiel menciite, per Konstitucia Akto deklaris sian konstantan neŭtralecon. Alia postmilita kazo estas tiu de Laoso, kiu per unuflanka Akto pri Neŭtraleco de la 9-a de julio de 1962 deklaris sin konstante neŭtrala kaj devontigis sin ne permesi al kiu ajn lando la uzon de la teritorio de Laoso por interveni en la hejmajn aferojn de aliaj landoj. Nur poste, per la Dektri-Potenca Deklaracio de Ĝenevo de la 23-a de julio 1962, la 13 ŝtatoj (inter kiuj P.R.Ĉinio, Usono, Soveta Unio, Hindio, Britio kaj Francio) deklaris, ke la suvereneco, sendependeco, neŭtraleco, unueco kaj teritoria integreco de Laoso estas garantiitaj kaj estos respektataj. Per tiu Deklaracio Laoso fariĝis neŭtraligita ŝtato same kiel Aŭstrio en 1955.

Troviĝas specialistoj pri Internacia juro, kiuj opinias, ke unuflanka deklaro pri konstanta neŭtraleco, distinge de neŭtraligo, ne havas per si mem efikon laŭ Internacia juro. Tiu opinio ne ŝajnas ĝusta. Deklaro pri konstanta neŭtraleco, se ĝi estas entenata en konstitucia akto aŭ alia jura dokumento, en ĉiu okazo estas jure valida laŭ la interna juro de la koncerna ŝtato. Tia deklaro neniel kontraŭas kiun ajn principon aŭ normon de internacia juro. Eĉ pli, ĝi estas konforma al suvereneco kiel unu el la fundamentaj principoj de la nuntempa internacia juro. Ĝi estas ankaŭ konforma al la sistemo de kolektiva sekureco jure difinita en la Ĉarto de UN. Se unu el la ĉefaj celoj de UN estas "konservi la internaciajn pacojn kaj sekurecon" kaj tiucele apliki efikajn kolektivajn rimedojn por preventi kaj forigi minacojn kontraŭ pacon, subpremi ĉiun ajn agon de agreso kaj ĝustigi aŭ solvi internaciajn disputojn aŭ situaciojn, kiuj povus konduki al rompo de paco, tiam, evidente, ŝtato povas kaj en sia intereso kaj samtempe en la intereso de paco deklari sian konstantan neŭtralecon. En tiaj kondiĉoj la deklaro pri konstanta neŭtraleco devas esti rigardata kiel jure deviga ne sole laŭ la interna juro de la ŝtato, sed ankaŭ laŭ internacia juro. Tiun interpreton apogas ankaŭ la fakto, ke tia ŝtato, eĉ pli forte ol ŝtato kondukanta nur politikon de neŭtraleco, havas ĉiujn rajtojn

kaj devojn de neŭtrala ŝtato laŭ internacia juro en kazo de milito.

Kompreneble, el vidpunkto de internacia juro eĉ pli forta estas *neŭtraligo*, t.e. konstanta neŭtraleco garantiita de la grandaj potencoj kaj de aliaj ŝtatoj. Ĝi sendube estas institucio de internacia juro. Tial, kia ajn malrespekto de la reguloj pri neŭtraligo ĉu fare de neŭtraligita ŝtato, ĉu fare de la garantiantoj kaj, tre verŝajne, ankaŭ fare de aliaj ŝtatoj, signifas malobservon de la koncernaj reguloj de internacia juro aldone al eventuala malobservo de pliaj principoj kaj normoj de tiu jura branĉo.

5. Konkludo.

El ĉio dirita almenaŭ la jenaj tri gravaj konkludoj povas esti faritaj:

(1) Neŭtraleco kaj neŭtraligo en la klarigita sencoj plu estas rekonitaj en la nuntempaj interŝtataj rilatoj kaj ankoraŭ kaŭzas difinitajn internacijurajn sekvojn, kvankam la aktuala valoro de tiuj institucioj konsiderinde ŝanĝiĝis kompare kun la signifo, kiun ili havis en la 19-a jarcento. Dum en la pasinta jarcentoj kaj komence de la 20-a ĝis 1914 oni fidis, ke neŭtraleco kaj neŭtraligo estos respektataj, la spertoj de la du lastaj mondmilitoj montris, ke ili ne donas efikan protekton

kontraŭ agreson, se la malobservo helpas la militajn celojn de la agresanto. Eĉ pli krudajn kaj pli ĝeneralajn malobservojn oni povas atendi fare de la agresita flanko en kazo de plia universala, totaleca milito.

(2) El vidpunkto de la monda paco kaj sekureco, la neŭtraleco kaj neŭtraligo oni neniel povas juĝi abstrakte, sed nur konkrete, prenante en konsideron la faktan politikan situacion. Ekzemple, la konstanta neŭtraleco kaj neŭtraligo de Svislando montriĝis utila eĉ dum la du grandaj mondmilitoj ankaŭ tial, ĉar ĝuste la fakta kaj internacijura pozicio de tiu ŝtato ebligis kontaktojn inter la militantaj partioj. Same pozitiva, almenaŭ en tempo de paco, estas la kreo de neŭtraligitaj bufŝtatoj inter la grandpotencaj blokoj, kiel en la kazo de Aŭstrio. Aliflanke, politiko de neŭtraleco aŭ deklaro de neŭtraleco en situacio evidente kondukanta al universala milito estas fakte nur kuraĝigaj por la agresaj fortoj, do negativaj el vidpunkto de la monda paco kaj sekureco. Se neŭtraligita ŝtato pro siaj juraj obligacioj ne rajtas ŝanĝi sian pozicion dum ĝi mem estas neatakita, la neŭtralaj aŭ neengaĝitaj landoj povus kaj devus decidiĝi, ankaŭ en sia propra intereso, favore al la potencialaj aŭ eĉ aktualaj viktimoj de agreso. Tio povus savi la pacon aŭ, se ĝi jam estas rompita,

kontribui al pli rapida ĉesigo de la milito. En ĉiu okazo, neŭtraleco estas neniel pravigebla en serioze minacaj konfliktaĵaj situacioj inter la agresantoj kaj iliaj viktimoj, inter la atakantoj kaj la sindefendantoj, inter la progresaj fortoj de demokratio kaj la sklavigaj de totalismo. Tio, cetere, estas konforma ne nur al la Ĉarto de UN, sed ankaŭ al la respektivaj normoj de la nuntempa internacia juro kaj al la bazaj principoj de internacia moralo, kiuj devas aplikiĝi, se la sekureca sistema de UN kolapsas.

(3) Se ŝtato deziras konduki politikon de neŭtraleco, ĝi mem decidas pri la sfero, amplekso, grado kaj formo de sia neŭtraleco. Tia ŝtato, same kiel neŭtraligita ŝtato, rajtas kaj devas utiligi ĉiujn permesitajn rimedojn, inkluzive kiel eble plej fortan armeon, por protekti sian neŭtralecon en tempo de paco kaj por sin defendi en kazo de milito. Neŭtraleco ne signifas, ne iam signifis, rezignacian pasivecon rilate la proprajn interesojn, ankoraŭ malpli rezignon pri sindefendo.

La supraj instruaj konkludoj estas adekvate aplikeblaj al neregistaraj organizoj bazitaj sur la principo de partipolitika neŭtraleco.



Mirindaĵoj en Lisbono



Juro kaj Kino



The Verdict (La Verdikto), 1982.

Reĝisorita de Sidney Lumet.
Roluloj: Paul Newman, Charlotte Rampling, Jack Warden, James Mason kaj Milo O'Shea.

20th Century Fox.

LA VERDIKTO

Temas pri filmo de Sidney Lumet de la jaro 1982. En ĉi tiu filmo Paul Newman plenumas unu el la plej altkvalitaj ludadoj en sia film-kariero kiel aktoro. Tiel, jam matur-aĝe, Newman interpretas rolon kiel advokato kontumaca kaj ribelema en rolo tre simila al tiuj luditaj dum lia jun-aĝo.

Lumet jam atingis grandan sukceson okaze de alia filmo de li reĝisorata kaj temanta ankaŭ pri juraj aferoj, tiu ne-forgesebla *12 Angry Men*. Tamen, ĉi-foje, Lumet ne arigis ĵurion ene de fermita ĉambro, male li analizas la rolon de advokatoj tra la vivo kaj laboro de Frank Galvin (*Paul Newman*), sen-esperema advokato kies ĉefa okupo estas trinki viskion en trinkejo kaj paroli pri antikvaj juraj kazoj.



Advokato Frank Galvin pridemandas atestanton

Unu el la plej interesaj kaj allogaj aspektoj de la filmo estas la prezentado de la ĉefrolulo. Jen advokato kiu troviĝas meze de men-detrua spiralo. Li estas viktimo de la jurista sistemo, kiu ruinigis lian prestiĝon kaj ankaŭ lian familion. Li pasas sian tutan tempon en trinkejo, apud biero kaj viskio, ankaŭ apud fliperludmaŝino. Tiel li rakontas al malmultenombra aŭskultantaro historiojn pri antikvaj jur-procesoj. Ĝis kiam unu el liaj malmultaj amikoj, ankaŭ advokato Mickey Morrissey (*Jack Warden*), proponas al li “ne-gravan” kazon pri kuracista neglekto.

Virino troviĝas en komata situacio post ricevi anestezon. La hospitalo, apartenanta al Katolika Eklezio, deziras silenti eblan skandalon kaj pro tio oni ofertas al la paciento, do al la familio ĉar ŝi troviĝas en komato, 210.000 \$, kondiĉe, ke ili rakontu neniun pri tiu afero.

Ĉiuj familianoj deziras akcepti la monon, eĉ la propra advokato ricevus sufiĉe altan mon-sumon por certigi trankvilan vivon. Tamen, kiam la advokato vizitas la virinon, jen unu el la plej altkvalitaj scenoj filmitaj iam de Lumet, ĉio agitiĝas interne de la advokato.



James Mason kaj Paul Newman en "La Verdikto"

Post koni la teruran situacion de la eksa paciento, la advokato komprenas, ke ŝi suferis grandan maljustaĵon kiun eĉ ne granda mon-sumo povus silenti. La virino ne povos ĝui la plej simplajn allogaĵojn en la vivo: paroli, aŭskulti, vidi... unu-vorte, ŝi ne povos plu senti. La advokato tiam, sen demandi la opinion de la familianoj, rifuzas la mon-proponon de la hospitalo kaj tiel li daŭrigas la proceson. Ĝuste tiam, ĉe la kutima trinkejo, li konas Lauran (*Charlotte Rampling*).

Dum la proceso ĉio komenciĝas malbone por la interesoj de la ĉefrolulo. La familianoj deziras ricevi la monon kaj tiel unu el ili eĉ pri-esploras la ŝtorman vivon de la advokato. Alie, la medicina fakulo, sur kies opinio baziĝus la pozicio de la advokato, malaperas. Krome, la prestiĝa kontraŭa advokato (*James Mason*) pravigas siajn argumentojn, kiuj estas bone akceptataj de la juĝisto mem (*Milo O'Shea*).

En la serĉado de eblaj atestantoj, Frank trovas eksan flegistinon de la hospitalo, kiu nun laboris kiel instruistino en Nov-Jorko. Tien li vojaĝas la advokato. Dume, lia amiko Mickey eltrovas, ke Laura reale estas spionino de la kontraŭa advokato. En tiu momento Frank rajtus peti la nuligon de la proceso, pro kontraŭleĝa spionado fare de unu el la partioj, tamen li simple rifuzas sian amatinon kaj daŭrigas sian agadon.



*Paul Newman kaj
Charlotte Rampling*

La eksa flegistino akceptas atesti en la juĝejo. Ŝi deklaras, ke la anesteziisto neglektis kaj li konis sian eraron, pro la fakto, ke li devigis la flegistinon ŝanĝi la dokumentojn de la kirurgia operacio. Tamen, ŝi gardis fotokopion de la dokumentaron antaŭ la ŝanĝado. La prestiĝa kontraŭa advokato senvalorigis la ateston de la flegistino, tamen li jam esti konscia, ke ĉio ŝanĝiĝis post tiu atesto.

La proceso finiĝas per la decido de la ĵurio, kiu akceptis la plendon de la paciento, do, oni pravigas la argumentojn de la advokato.

Post la juĝo Laura decidas ekkontakti telefone kun Frank, tamen, okaze de la lasta bildo de la filmo, li decidas ne preni la telefon-alvokon.

Tutcerte en la reala vivo, preter la filmoj, estas pli facile pravigi la opiniojn, argumentojn kaj deklarojn de la gravuloj kaj ne tiuj de la malfortuloj. Ĉi tiu filmo montras, ke por aŭskulti ĉiujn argumentojn, ankaŭ tiuj kiuj ne estas ĉiopovaj, utilas la advokatoj, kies ĉefa celo devas esti lukti favore al lia kliento. Ĉi tio estas taŭga ankaŭ por la advokato men, ĉar tio donas sencon al lia laboro.



La belega *Praça do Comércio* en Lisbono.
Sidejo de la Suprema Justica Tribunalalo kaj de la Ministerio pri Justico

Notoj:



Eldonita en la urbo CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio) julio 2018.

Prezentita en LISBONO (Portugalia), okaze de la 103-a Universala Kongreso de Esperanto, 28-a julio / 4-a aŭgusto 2018.